

STARTO

N-ro 3/2020 (276)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



foto L. Dvořáková

Koncerto de Ivan Acher, Tereza Marečková kaj Jana Vébrová
en Svitavy la 5-an de septembro 2020

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz/redakce@esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Vacenovice 398, 696 06 Vacenovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, grupo por ciferecigo (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:

Dagmar Martinková, Chelčického 51, 568 02 Svitavy, martinkova.sy@seznam.cz, — sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligan al la gazeta retejo

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

Vicprezidanto: Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, tel. 602 611 584, tomecek@esperanto.cz (retejo, muzeo)

Kasisto: Vratislav Hirs, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 517 444 117, vratislav.hirs@esperanto.cz (membro-datumbazo, kontado)

Komitatano: Leonarda Chaloupková, K Panskému poli 160, 251 01 Světlá, tel. 732 415 094, leonarda.ch@seznam.cz (laboro kun kluboj kaj sekcioj, subvencioj)

Komitatano: Andrea Švubová, Brněnská 3474-32A, 695 01 Hodonín, tel. 604 850 689, a.svubova@email.cz (konferencioj, kongresoj, kunlaboro kun ĈEJ, subvencioj)

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 737 562 479, 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobříčovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

UEA-kotizperanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Administraz: Petr Chrdle.

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz, www.muzeum.esperanto.cz

Facebook kaj Ipernity

www.facebook.com/Esperanto.cz/

www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy

www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/


www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Dvořáková

VIRTUALA ESPERANTO-KONGRESO

Mondafest' 20 junio – 20 septembro 2020

Pro kronviruso ne povis realiĝi multaj ĉi-jaraj aranĝoj, inkluzive de **UK en Montrealo**. Ili estas anstataŭigitaj virtuale, tio signifas, ke prelegantoj sidis hejme ĉe siaj komputiloj, parolis en mikrofonon kaj estis aŭskultataj de tiuj, kiuj same sidis ĉe komputiloj en siaj hejmoj.



Multaj el la paroladoj estas spekteblaj ĉe Youtube, retejo de videoj. Krom tio estis eldonitaj t.n. Kongresaj Kurieroj, kiuj priskribas la agadon de la virtuala kongreso.

Same virtuale realiĝis **Somera Esperanto-Studado 2020**, planata por Kroměříž, **Junulara Kongreso, ILEI-konferenco, KAEST** k.a. Normalaj renkontiĝoj estis prokrastitaj al 2021, se la pandemio tion permesos. ILEI eĉ planas fari hibridan konferencon, ĉar la virtualan partoprenis 350 personoj, duoblo ol dum ĉeesta konferenco.

La 1-an de aŭgusto okazis solena inaŭguro de la virtuala kongreso per salutvortoj kaj kongresa temo: **UN 75-jara: dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝiĝanta mondo**.

Dum la virtuala kongreso realiĝis ĉiuj

kutimaj kongresaj programeroj, koncertoj, teatraĵoj, kunvenoj de fakaj asocioj, tagoj de unuopaj kontinentoj k.s.

Merkredo, jam tradicie dediĉata al ekskursoj, proponis virtualajn vojaĝojn al Jerusalemo, Venezuelo, Montrealo, Parizo, Tanzanio, Teherano, Pekino kaj la usona Elsah.



La Ĝenerala Kunveno 2020 de la Komitato de UEA elektis **Humphrey Tonkin** kiel honoran prezidanton de UEA.

Kiel Honoran Membron de UEA oni elektis kroaton **Zlatko Tišljär**, kiu bedaŭrinde post monato forpasis (legu la nekrologon sur. p. 85).



Ne mankis Internacia **Kongresa Universitato**, kies prelegoj en unu kajero estas senpage elŝuteblaj el la retejo de Revuo Esperanto:

<https://revuoesperanto.org/prirevuo>

Rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA en 2020

Partoprenis 151 verkoj el Afriko, Azio, Eŭropo kaj Ameriko.

BRANĈO POEZIO

Juĝkomisiono: Krys Williams, Ĵak Le Puil, István Ertl. Partoprenis 56 verkoj de 31 aŭtoroj el 19 landoj [5 el Afriko, 13 el Ameriko, 9 el Azio, 29 el Eŭropo]

Unua premio: “Mia kvaropo admirinda” de Nicolino Rossi, el Italio.

Dua premio: “Ek sor” Evgenij Georgiev, el Kazahio.

Tria premio: en egaleco por jenaj tri verkoj:

“La renkonto kun la trompo” de Tiberio Madonna, el Italio.

“Pri-kronviro kroniko...” de Sergo Sir’, el Francio.

“La nigra dio” de Jesper Lykke Jacobsen, el Francio.

BRANĈO PROZO

Juĝkomisiono: Giulio Cappa, Tim Westover, Trevor Steele

Partoprenis 27 verkoj de 18 aŭtoroj el 16 landoj [2 el Azio, 1 el Afriko, 4 el Ameriko, 20 el Eŭropo].

Unua premio: “Finjo” de Vladimir Opletajev, el Rusio.

Dua premio: “Muŝribelo” de Ewa Grochowska, el Francio.

Tria premio: “Nova Dekameron” de Paulo Sérgio Viana el Brazilo.

SUBBRANĈO MIKRONOVELO

Juĝkomisiono: Giulio Cappa, Tim Westover, Trevor Steele. Partoprenis 50 verkoj de 24 aŭtoroj el 13 landoj [11 el Ameriko, 10 el Azio, 29 el Eŭropo].

Unua premio – Premio Paula Adúriz: “La stranga butikumo” de Francisco Javier Moleón el Hispanio.

BRANĈO TEATRAĴO

Juĝkomisiono: Giuliano Turone, Sergo Sir’, Saša Pilipović

Partoprenis 1 verko de 1 aŭtoro el 1 lando.

Neniu premio estis aljuĝita.

SUBBRANĈO MONOLOGO AŬ SKEĈO

Juĝkomisiono: Giuliano Turone, Sergo Sir’, Saša Pilipović. Partoprenis 6 verkoj de 5 aŭtoroj el 4 landoj.

Unua premio – Premio María Cuevas: “Ne tute, nur duone” de Tiberio Madonna el Italio.

BRANĈO ESEO

Juĝkomisiono: Gotoo Hitoshi, Antonio Valén, Giridhar Rao. Partoprenis 10 verkoj de 10 aŭtoroj el 9 landoj [6 el Eŭropo, 2 el Azio, 1 el Afriko]

La unua premio – Premio Luigi Minnaja: ne aljuĝita.

Dua premio: “Komparo inter Esperanto kaj Okcidentalo” de Emanuele Bovio-Regano el Italio.

Tria premio: ne aljuĝita.

Gajnis honoran mencion la verkoj:

“Halka kantas esperante” de Roman Dobrzyński el Pollando.

“De hilelismo al Homaranismo: Ĉu nova hipotezo?” de Roberto Lloancy el Francio.

INFANLIBRO DE LA JARO

Juĝkomisiono: Ricardo Albert Reyna, Jang Jeong-Ryeol. Partoprenis 1 infanlibro.

La premio estas aljuĝita al la Eldonejo Esperanto- Asocio de Britio pro la verko “La krubalo” de Julia Donaldson kaj Axel Scheffler.

Ĉi-jara Somera Esperanto-Studado (SES)

Mi tre antaŭĝojis je ĉi jara SES, kiu estis okazonta en ĉarma moravia urbo Kroměříž.

SESon mi antaŭe neniam partoprenis. Estis aliĝintaj multaj interesantoj el multaj landoj, kiuj certe ankaŭ antaŭĝojis je tiu aranĝo.

Bedaŭrinde, kaŭze de minaco de kronviruso, la persona kunveno ne povis ebligi, do la organizantoj decidiĝis pri virtuala formo. Tiam multaj homoj malaniĝis, sed aliaj novaj, preskaŭ de ĉiuj mondpartoj, venis.


Mi restis aliĝinta, kvankam miaj komputil-scioj kaj spertoj ne estas grandaj. (Antaŭ neloga tempo mi sciis pri komputilo nur tion, ke ĝi ekzistas!).

Antaŭ komenco de la SESo mi ricevis de la organizantoj lingvan teston, laŭ kiu oni envicigis min en kurson C 1. Poste mi ricevis pasvorton kaj jam vendrede la 17-an de julio mi povis aliĝi al la SES aranĝo. Mi sukcesis!



Vespere la ĉeforganizanto Petro Baláz oficiale malfermis la retan SES renkontiĝon. Li salutis la partoprenantojn, konatigis ilin kun programo kaj aliaj aferoj ĉirkaŭ la studado.

Sabate kaj dimanĉe de la 9-a ĝis 14-a horo (kun unuhora paŭzo por tagmanĝo) okazis mia studado. (Dum labortagoj okazis la studado antaŭvespere). Mi sukcesis „enretiĝi“, do miaj samkursanoj vidis kaj ankaŭ aŭdis min, kio eĉ kortuŝis min. Mi vidis kaj aŭdis la ceterajn, sed post kelka momento ĉio malaperis! La organizantoj skribis, ke la partoprenantoj prefere malfunkciigu la kameraojn kaj lasu nur mikrofonojn, por ke la reto ne estu tro ŝarĝita. Do bone. De tiu tempo ni, kursanoj, vidis ĉefe nian instruiston kaj nur tiun studenton, kiu enmomente parolis.




Flanke de la ekrano en kadreto oni povis skribi mesaĝojn al la aliaj (= interparoli), respondojn al demandoj de la instruisto kaj la samkursanoj ktp. Nia instruisto Konstantin Tikhomirov (Koĉjo) estis sperta gvidanto de la kurso, afabla, pacienca, ... Liaj lecionoj estis interesaj kaj buntaj.

Estis multaj temoj, kiujn ni pritraktis. Farante rimarkojn kaj skribante hejmajn taskojn kaj novajn vortojn mi, dum la ok taga kurso, plenumis duonon de mia laborkajero.

Krom la studado de Esperanto okazis vesperaj programoj – paroligaj rondoj, prelegoj, koncertoj, gufujo, drinkejo kaj aliaj allogaj aranĝoj. Mi, diligenta studento, partoprenis ĉefe la studadon. Bedaŭrinde ofte ne obeis min aŭ mikrofono aŭ kamerao, aŭ ambaŭ, do mi nur aŭskultis, kio okazas en la „klaso“.

Post pli ol unu semajno la SESo finis. Petro adiaŭis kun la instruistoj kaj siaj kolegoj kunorganizantoj, li dankis al ili kaj ankaŭ al la partoprenantoj. (Por la partoprenantoj de Usono, Japanio kaj aliaj malproksimaj landoj oni elsendadis la studadon kaj kelkajn programerojn eĉ nokte, je la 2-a, 3-a horo).



La SESon partoprenis 183 homoj el 38 landoj, okazis 123 programeroj, 42 horoj da paroligaj rondoj kaj „multe da biero eldrinkiĝis en drinkejo“!, diris Petro.

Petro kaj ĉiuj organizantoj, KORAN DANKON por Via laboro, por organizo de tiu ĉi sukcesa aranĝo!!!

(Sed por mi venonte PERSONAN renkontiĝon, mi petas).


LChal

ILEI-konferenco virtuale

Ankaŭ Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj devis ĉi-jare nuligi sian ĉeestan konferencon kaj anstataŭgi ĝin virtuale. La rezultoj estos troveblaj ĉe la adreso <https://1url.cz/tz4dS>



Jam nun povas interesatoj aŭskulti kelkajn prelegojn, ekzemple enkondukan prelegon de Mireille Grosjean, prezidantino de ILEI, pri la malfacila ĉi-jara situacio, kiu tamen kaŭzis ekeston de novaj retaj prezentoj.



Ŝi montras, kie vi trovos pedagogiajn gazetojn, diskutejojn pri instruado, facilan legaĵon pro viaj kursanoj k.s. Ŝi mem estas ekzemplo, ke la interreto ne estas „nur por la junaj“, ke eĉ vi povas ellerni uzi komputilon kaj utiligi servojn de la interreto.

-mm-

14 ELSTARAJ AGANTOJ DIPLOMITAJ DUM LA VIRTUALA KONGRESO DE ESPERANTO

En la Solena Fermo de la Virtuala Kongreso de Esperanto estis anoncitaj la nomoj de la 14 ricevantoj de la Diplomoj 2020 pri Elstara Agado aŭ pri Elstara Arta Agado. Tiuj diplomoj estas aljuĝataj de la Estraro de UEA ekde la jaro 2007.

Elstara Agado:

Aleksandr Korĵenkov kaj Halina Gorecka (Rusio) pro elstara agado kiel redaktoroj de la Ondo de Esperanto kaj kiel eldonistoj ĉe Eldonejo Sezonoj, kiu ekde 1983 jam publikigis vere eminentajn verkojn por Esperantujo;

Lee Jung-kee (Koreio) pro longtempa elstara agado kiel motoro de la Seula Esperanto-Centro, julie kun 337-a kurso el 2-monataj lernadoj, ekde 1991;

Rakoen Maertens (Belgio) pro elstara agado kiel reprezentanto de TEJO kaj UEA ĉe UN kaj Unesko; inter alie dum la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Parizo kaj en la Junulara Forumo de UN-Ekosok;

John Magessa (Tanzanio) pro elstara agado pri restarigo de la movado en Tanzanio;

Jean-Pierre Marcq kaj Evelyne Rotellini (Francio) pro elstara agado per la asocio Esperanto plus, kiu finance subtenas afrikajn aktivulojn kaj pro kreo de la [NOMAD-kurso](#);

Yves Nevelsteen (Belgio) pro elstara kunlaborado en pluraj retaj agadoj (Eventa Servo, Vikipedo, Komputeko), starigo de la fonduso Instigo-Liberapay,

Esperanto-traduko de retejoj kaj programoj kaj aliaj projektoj, kiel Eksterrete kaj kolekto de markoj en Esperanto;

Fernando Ŝajani (Brazilo) pro elstara agado kiel fondinto de la retejo Eventa Servo;

Bert Schuman (Francio) pro longtempa elstara agado kiel organizanto de la Internacia Infana Kongreso kaj motoro de la Esperanto-Kulturdomo en Greziljono.

Elstara Arta Agado:

Pascal Dubourg Glatigny (Germanio) pro la elstara kontribuo al la literatura Esperanto-kulturo inter alie per la projekto Militrakontoj;

Kjara (Chiara Raggi) (Italio) kantverkisto, aŭtoro, gitaristo kaj komponisto, pro la elstara kontribuo al la muzika Esperanto-kulturo, inter alie per sia koncerto, kiu fermis la virtualan 52-an Malferman Tagon, kaj pro sia regula reta prezentado dum la socia izoliĝo;

Ale Kosabela (Argentino/Brazilo) pro la elstara kontribuo al la muzika Esperanto-kulturo per sia vasta Esperanto-muzika produktado, pro la talenta kunlaboro kun pluraj esperantistaj artistoj, kaj pro la lanĉo de La Pordo;

Istvan Nemere (Hungario) pro la elstara kontribuo al la Esperanto-literaturo, kiel unu el plej produktemaj verkistoj.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

Renkontiĝo en la muzeo

En la tagoj 4-6 septembro 2020 okazis en Esperanto-Muzeo en Svitavy internacia renkontiĝo. Krom partoprenantoj el Ĉeĥio venis gastoj el Pollando kaj Slovakio.



Komune ni rigardis muzikajn benkojn (benkojn en formo de muzikinstrumento) kreitajn enkadre de Skulptista Memorfesto de Alois Petrus dediĉitaj al signifaj muzikistoj de Svitavy, kaj ekspozicion de humura pentristo Pavel Matuška. Ĉiĉeronis emerita direktorino de la urba muzeo Blanka Čuhelová.



Rigardante el la preĝeja turo ni estis konatigitaj kun la historio de Svitavy, kiun prezentis Jan Richtr.



Ni senvualigis memortabulon sur ŝtono antaŭ Esperanto-arbo, kiun la loka klubo donacis al ĈEA. Realigis premiero de filmo „Ŝlosiloj“, kiun prilaboris Pavol Kaščák en reĝio de Radka Oblouková kun teatro DOMA.





Petro Chrdle projekciis rememoran filmon pri Stanjo.

Vespere nin reĝisoro kaj komponisto Ivan Acher akompanis tra koncerto de Jana Věbová kaj Tereza Marečková, kiuj akiris honorigon eĉ eksterlande, samtempe li konatigis nin kun sia komponista kaj reĝisora laboro kaj kun problemoj, kiujn li devas superi. La vesperon finis aŭtoĝramado.



Kunlaboro inter amantoj de teo

La 2-an de septembro 2020 okazis inaŭguro de ekspozicio „Teo, Amo kaj Mondo“ en la Regiona Biblioteko en Žilina. La ekspozicion preparis membrino de loka esperantista klubo Magdalena Feifičová kunlabore kun estrino de libra-informa servo Mgr. Jana Nesluša-

nová rekte en la granda enirhalo, kie ĉiuj vizitantoj de la biblioteko havas eblon rigardi pli ol 100 fotojn el la tuta mondo pri kultivado kaj prilaboro de teo kaj pri tea kulturo. Temas pri fotoj el tutmonda fotografista konkurso, kiun partoprenis ankaŭ la E-klubo de Svitavy. La aŭtorino de la ekspozicio Magdalena Feifičová enkonduke prezentis belan kaj trafan poemon pri teo. Plue ŝi konatigis la partoprenantojn kun historio de la tuta aranĝo kaj kun ĝiaj iniciatintoj el scienc-teknika universitato de Tianjin, kun manieroj de prilaboro de unuopaj specoj de teo kaj sur grandformata ekrano ŝi prezentis salutojn de ĉiuj organizantoj de la ekspozicio el 21 landoj de Azio, Eŭropo kaj Ameriko.

En la dua parto de la aranĝo membrino de E-klubo de Svitavy Li Huang prezentis ceremonion de teo kun gustumado de veraj ĉinaj teoj kaj konatigis la ĉeestantojn kun preparo de teoj, kun kultivado kaj kutimoj ligitaj kun teo en Ĉinio kaj Vjetnamio. La aŭskultantojn la ceremo vere kaptis kaj disvolviĝis riĉa diskuto. Antaŭ fermo kelkaj partoprenis ankaŭ en pentrado sur teo-folioj. Rekompence ili ricevis ĉinajn simbolojn de feliĉo.




Libuše Dvořáková

KLUBA VIVO

Písek

Somere, limigite en vojaĝado, ni almenaŭ revigligis korespondadon kun kluboj en Nederlando kaj Pollando kaj interŝanĝis Esperantajn videojn kaj virtualajn fotoalbumojn.

Ripete ni vizitis Petron Chrdle en la [banloko Vráž](#), en kiu li kuracis sin post la bicikloakcidento. Por la loka publiko li pretigis du prelegojn - pri [Bertha von Suttner](#) kaj pri komparo inter Koreio kaj Japanio, trafe menciante en la temo ankaŭ Esperanton.



La 30-an de julio ni persone konatiĝis kun kantistino Lenka Němečková kaj violonĉelistino Sylva Jablonská, kiuj prezentis ĉarman klasikan koncerton en la Urba Biblioteko Písek. La artistinoj pro simpatio al la ideo de Esperanto meminiacie volis elekti por sia nova duo komunan Esperantan nomon, kion ili menciis ankaŭ kadre de la koncerto. Post la sekva konsulto ili decidis pri **"LUDANTAJ KOROJ"**. Ili entuziasmiĝis pri la fakto, ke en Esperanto ekzistas tradukoj de multaj klasikaj kaj popolaj kantoj. Tiel ni komencis esperdonan kunlaboron, kies unua frukto povus esti ekz. kelkaj kantoj en Esperanto dum la preparata kristnaska

koncerto. Kaze de sukceso ni informos vin en [Esperanto.cz](#).



Dum la feriado en Ercmontaro ni renkontiĝis kun la iama junulara aktivulo kaj organizanto de aranĝoj Jan Navrátil el Teplice. Ni ne nur kune rememoris, sed ankaŭ interkonsentis ciferecigon de fotoĵoj de aranĝoj por dokumentado de la agado de la tiama Junulara Sekcio de ĈEA. Sekve ni jam startis.

Jarka Malá ankaŭ dum feritempo daŭrigis sian admirindan ĉiusemajnan kontribuadon al elsendoj de la [ESPERANTA RETRADIO](#), gvidata de Anton Oberndorfer el Aŭstrio. Ŝi raportis ekz. pri: Suna elektro el fenestraj vitroj, Aerobiaj ekzercoj reunigas la cerbon, Efika sed tro malmultekosta medikamento (Isoprinosino kontraŭ kovim-19)¹, En la mondon venis nova VoKo, Mikroplastaĵoj en marfiŝoj k.a. Ĉion ĉi kaj multon pli eblas aŭskulti klakinte al la supra retligilo.

-padv-

¹ Malmultekosta kaj tial ne profitdona por produktantoj

Vladimír DVOŘÁK - 60



Vladimír DVOŘÁK naskiĝis la 11-an de septembro 1960 en Prago. Laŭprofesie inĝeniero pri ekonomio (kun specialiĝo aŭtomatigitaj direkt-sistemoj), li eklernis Esperanton en 1983 en koresponda kurso ĉe s-ino Štruncová. En 1986 li ekagis en la Junulara Klubo en Prago. Dum lia prezidanteco en la Junulara Sekcio de ĈEA en 1989-1992 senteble ampleksiĝis aktivecoj de gejunuloj kaj internacia kunlaboro. En 1991-1993 li estis vicprezidanto de ĈEA kaj en 2011-2016 prezidanto de ĈEA. Li meritis precipe pri jura transformiĝo laŭ novaj reguloj kaj pri ekonomia plifortigo de la asocio.

Kun sia edzino Pavla li organizis dekojn da aranĝoj, krom la junularaj (JUSETUR, Someraj kursoj k.a.) temis ekz. pri la Antaŭkongreso de la 43-a IFEF-Kongreso en Prago (1991), Antaŭkongreso de la 77-a UKo en Prago (1992), ILEI-Konferenco en Tábor (1996), Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj en Sedlice (2006) kaj pri kvin ĈEA-konferencoj kaj kongresoj (2012-2016).

En Písek, kie li loĝas ekde 2003, li longdaŭre senpage aktivis ankaŭ en la infanhejmo, tenisa klubo kaj grupiĝo de loĝejposedantoj.

Lančov 2020

Ĉi-jare okazis du etapoj, nur en la dua estis Esperanto-kurso kun kvar kursanoj, du 11-jaraj knabinoj, komencantinoj, 16-jara junulino kaj 18-jara junulo, ambaŭ progresintoj. Li jam aliĝis al nia Ĉeĥa Esperanto-Junularo. La kurson gvidis Miroslav Malovec.

Fine de la etapo estis instalita **wifi-anteno**, kiu venontfoje ebligas al portebblaj komputiloj kaj saĝtelefonoj aliron al interreto.

Tuj post la dua etapo sekvis jam tradicia renkontiĝo de iamaj tendaranoj, venis ĉirkaŭ 30 personoj malgraŭ pandemio.



La ĉefa programo estis vizito de la ĉelima kastelo Nový Hrádek u Lukova.



Ne mankis tradicia tendarfajro kun kantado. -mm-

La 6-a Esperanto-staĝo en METABIEF

La aranĝo okazis de la 23-a ĝis la 29-a de aŭgusto 2020 en montareca pejzaĝo de ĵurasa regiono en la vilaĝo *Metabief* proksime de la svisa limo. La aranĝon organizas la klubo de "Esperanto *Chalonnais*" sub la gvidado de Anne-Marie Ferrier jam la sesan fojon. Tiu ĉi jaro estos memorata kiel la jaro de tutmonda pandemio Kovim-19 (**kron-virusa malsano 2019**).



Ni loĝis en montara junulara gastejo *Les Sapins de l'Amitié* (La abioj de Amikeco), kiun prizorgas la asocio *Claj* (*Clubs de loisirs et d'action de la jeunesse*). La direktoro Djemel Zeffane afable bonvenigis nin kaj donis informojn pri la domo kaj pri la striktaj kondiĉoj pro la Kronviruso. Ni devis uzi maskojn, krom dum la manĝado kaj dum la instruado. Ekster la domo estis laŭvola uzado de ili.

La unua vespero komenciĝis per la bonveniga aperitivo kaj poste sekvis prezentado de la ĉeestantoj. La aranĝon partoprenis dudek tri geesperantistoj el Francio kaj unu el Svislando. La progra-

mo konsistis el matenaj kaj antaŭvesperaj E-kursoj, posttagmezaj ekskursoj al diversaj lokoj kaj la vesperoj estis dediĉitaj al prelegoj aŭ ludoj. Per diversaj ekskursoj la partoprenantoj povis malkovri interesan regionon, promeni en la ĉirkaŭaĵo, bicikli al diversaj partoj en tiu angulo situanta proksime al Svislando. Agrablaj por rigardi estis matenaj sunleviĝoj, vesperaj sunsubiroj kaj unufoje eĉ ĉielarko beligis la horizonton.



Plej fluajn parolantojn Renée Triolle instigis al legado de diversaj tekstoj kaj sekvis diskutado. Ni traktis diversajn temojn: pri rubaĵoj, kafo, topinamburo¹, pandemio, atomcentraloj, sekreta vivo de lavmaŝinoj, Marjorie Boulton, judoj kaj holokaŭsto, indiĝenaj lingvoj en Sud-ameriko, mikrokreditoj, ktp. Ne mankis iom da gramatika ekzercado. Luc Allemand kaj Jacqueline Poux gvidis kurson por progresantoj. Libroservo proponis E-librojn. Andreo Grossmann prezentis kajerojn de TAKE pri konstruado.

¹ slunečnice topinambur s jedlými hlízami

Post la bona kaj abunda tagmanĝo ni povis elekti diversajn ekskursojn. Interesa estis vizito de la mezepoka kastelo *Fort de Joux* transformita al fortikaĵo. Ĝi havas la plej profundan puton (120 metrojn) en Eŭropo. Ne malpli interesa estis vizito al grotoj de *Vallorbe*, situantaj en Svislando. La kavernoj estiĝis pro la subtera elfluo de *Orbe* el la lago de *Joux*. En Svislando ni vizitis ankaŭ la muzeon *Baud* de mekanikaj muzikiloj. Kelkaj el ili estas veraj unikaĵoj.



Alia interesa vizito gvidis nin al la fromaĝejo Marcel Petite. *Fort Saint Antoine* estas malnova militfortikaĵo transformita al kelo por maturigado de la fromaĝo *Comté*. Ĝi estas unu el la plej ŝatataj fromaĝoj. Impresis altaj stokoj da plurkilogramaj fromaĝ-diskoj. Feliĉe la laboro estas aŭtomatizata.

En la "Domo de la rezervejo" sur areo je 500 m² estas instalitaj interagaj ekspozicioj dediĉitaj al faŭno kaj flaŭro de la ĵurasa montaro. En proksimeco oni povas promeni ĉe la lagoj de *Remoray* kaj de *Saint-Point*, kiuj estas bone rimarkeblaj el belvidejo en alteco je 940 metroj. Kelkaj el ni biciklis al pli foraj lokoj. En *Metabief* ni vizitis fromaĝejon

de *Mont d'Or*, kie oni povas aĉeti diversajn fromaĝojn kaj aliajn regionajn produktaĵojn.

Ĵaŭde ni havis la plezuron akcepti viziton de Mireille Grosjean kun amikino ŝia. Mirejo regalis nin per ĉokoladaj bombonoj "Merci". Venis ankaŭ du instruistoj: Emmanuel Desbrières kaj Alexandre André. Ili instruas en francaj lernejoj kaj rakontis al ni pri siaj spertoj pri enkonduko de Esperanto, pri interŝanĝoj kun aliaj lernejoj kaj pri vojaĝo kun lernantoj al Slovenio.



Vespere Renée Triolle prelegis pri la interesa vivo de Victor Lebrun, kiu estis franca esperantisto kaj iama sekretario de Leo Tolstoj. Alia ŝia prelego temis pri famaj virinoj en Esperantujo. Luc Allemand rakontis kaj per bildoj ilustris sian vojaĝon per biciklo ĉirkaŭ la Nigra maro. Alian interesan (kvarmonatan) vojaĝadon per ĉevalo prezentis Nathalie Rigaut. Ni ankaŭ ĝuis ludadon de liro fare de Luc Allemand.

Post longa tempo sen fizikaj E-renkontiĝoj ni povis ĝui agrablan semajnon en bona familia etoso.

Liba Gabalda

Vojaĝo por kleriĝo kaj al amikoj

Komence de aŭgusto 2020 kelkaj membroj de esperantista klubo en Svitavy vojaĝis tra regiono Liptov en Slovakio. Tranoktadon ni ricevis en Liptovský Mikuláš. Ni vizitis ankaŭ Liptovský Ján kun moner-farejo, kie Ján Vajs partoprenas en produktado de memor-moneroj, Liptovský Hrádok kun busto kaj tombo de kuracisto D-ro Albert Škarvan (aŭtoro de la unua lernolibro de Esperanto por slovakoj).



Tombo de d-ro Škarvan

Ni fotis nin ĉe Esperanto-arbo en parko apud la burgo.



Ni iris ankaŭ al Pribilina kun hotelo Esperanto – bedaŭrinde jam dezerte senhoma. En Oravské Podhradie ni vizitis Oravian burgon, muzeon de kaleŝoj kaj navigis la riveron Orava sur flosoj. En Stará Bystrica ni rigardis plej grandan sunhorloĝon kun astronomia horloĝo kaj en Nová Bystrica ni veturis sur etŝpura fervojo tra skanseno. Jan Richter eĉ forvojaĝis vizite al Tatranská Lomnica, la ceteraj veturis supren al monto Chopok. Ne mankis ankaŭ akvoparko Tatralandia kaj miniatur-urbeto Tatrapolis, precipe por infanoj, kiuj nin akompanis.



Parto de nia semajna ekskurso estis ankaŭ vizito al amikoj – esperantistoj el klubo Liptovský Mikuláš, kun kiuj ni kunlaboras jam preskaŭ 10 jarojn. Realigis aranĝo „Klubo en klubo“ en la naci-kultura domo „Matica slovenská“. Dum la tuta vespero ni babilis kaj interŝanĝis spertojn pri kluba laboro.

Ni rememoris komunan aranĝon en la Urba Muzeo kaj Galerio de Svitavy 2013 „Post duono“ – kio estis ekspozicio de fotoj pri vojaĝado al plej altaj montopintoj de Eŭropo. Ni pritraktis aranĝojn okazigitajn kaj planatajn. Nun ni antaŭĝojas pri venonta renkontiĝo, ĉi-foje en Žilina.



Ni rememoris ekspozicion pri montopintoj de Eŭropo en Svitavy 2013

Libuše Dvořáková

Esperanta Klubo „Amikeco“ Česká Třebová festis 60-jaran datrevenon

Antaŭ sesdek jaroj kunvenis kelkaj interesuloj kaj fondis societon kun nomo Esperanta rondeto „Amikeco“ ĉe Uzina klubo de fervojistoj. Tuj ili organizis kurson de Esperanto kaj post ne longa tempo iliaj vicoj rapide kreskis. Sekvis pluraj kursoj, ekspozicioj, kunvenoj kun najbaraj rondetoj kaj unuaj eksterlandaj kontaktoj kaj vizitoj. La agado de klubo estis vigla kaj multflanka. La plej konataj aranĝoj de la klubo estis Esperantaj baloj kaj Esperantaj Silvestroj.

En lasta finsemajno de monato junio ĉijare la klubo invitis siajn konatulojn kaj najbarojn el diversaj esperantaj kluboj kaj organizis kunvenon omaĝe al 60-jara datreveno de sia fondiĝo. Post alveno en Česká Třebová tuta

grupo de 33 gepartoprenantoj el 12 urboj vizitis urban muzeon kaj poste parkon Javorka, kie ĉe memorŝtono instalita antaŭ 10 jaroj dum duoncentjara datreveno ili faris komunan foton.

La programo poste daŭris en restoracio „Národní dům“ – iama sidloko de la klubo, per tagmanĝo kaj posttagmeza programo. Dum la programo la prezidantino de la klubo Ilona Bauevová salutis ĉiujn gepartoprenantojn kaj Jana Křížková en sia parolado rememoris ĉiujn gravajn eventojn el multjara agado de la klubo. Inter la gastoj estis reprezentantinoj de ĈEA sinoj Hýblová kaj Chaloupková.

Ladislav Kovář



Intervjuo okaze de mia 80-jara jubileo (pasinta en 2019) kun la redaktoro de BULTENO

je la demandoj:

Kio (en Esperantujo) estis por Vi:

1. plej kortuŝiga
2. plej ĝojiga
3. plej malĝojiga

La sprita leganto certe ekscios, ke la demandojn liveris mi mem dezirante eviti la kutimajn, kiuj pro sia banaleco enuigas la legantojn tiom, ke oni ilin ne legas (mi tion fara(da)s...). Oni ja ne povas en la nura „rememoriga“ artikolo priskribi plenajn biografiajn rememorojn, tial mi elektis ion el la lasta tempo (do – pli malpli aktualan).

Ad1) Ĝuste en mia „jubileo-jaro – do en 2019 – mi ĝuis kortuŝplenan Esperantan eventon: la OSIEK-konferencon, kiu okazis en la hungara urbeto KONDO-ROŜ. Kelkajn mi jam partoprenis – ekzemple en Prago, 2003, kiun organizis Petro Chrdle, kie havis siajn parolojn niaj eminentuloj Eli Urbanová (pri siaj biografiaj, poemplenaj aferoj), Jiří Patera (pri historio de Prago), Vlastimil Kočvara (la hobio-kolektanto de la poemo „Máj“, pri ties 200-aj eldon-ekzempleroj)... Do ĝuste la aferoj, pri kiuj ni – praganoj – fieras kaj ŝate rememoras. Tiam ni estis multaj (eble 60)...

La menciita OSIEK en Kondoroŝ havis nur cca 20 partoprenantojn, sed ĝi havis ĉiujn kvalitajn atributojn de la renoma konferenco pri literaturo, kiel tio estis destinite ĉe la fondo de ĝi: same havis la „ĉefan temon“ – tute nature tio estis „La hungara literaturo“.

Min rilate: Troviĝis en mia biblioteko

la libro „Sklavoj de Dio“, kiujn mi pasinttempe kun intereso tralegis; ĉar ĝi traktas la epokon de la 13-a jarcento, en Hungario, kiam la juneta princino MARGIT (laŭ ŝi mi ricevis nomon) fariĝis monaĥino, poste la nacia sanktulino, kaj preskaŭ fariĝis edzino de la ĉeĥa reĝo Přemysl Otakar II.

Tuj mi rememoris la tempe daŭrigan eventon, kiun prezentadis Eva Seemannová: „Kunhuta – kdysi královna česká“. La legantoj sciu – ke tiu Kunhuta estis anstataŭintino de la menciita Margit (kiu forte malkonsentis kun la propono je la edzeco) kaj ke poste ŝi „estis farita“ edzino de la reĝo Přemysl. Do, mi sciigis al la aŭskultantoj kiel la historioj de niaj landoj estis „kunplektitaj“, kaj tiun ĉi fakton mi ekuzis por plenumi la postulon de la ĉeftemo. Sed plu: mi nun volas „jubilei“ la plej meritplenan anon de nia klubo – do Eva SEEMANNOVÁ, kies 100-jaran naskiĝdaton ni rememoris je la 21.3.2020.

Ke la supre menciita afero ne estu por la legantoj nur dato, mi jen liveras al ili parton de la teatra monologo pri Kunhuta (kiun mi en mia traduko prezentis en la kunsidejo de OSIEK en Kondoroŝ):

Naskiĝo kaj morto – mejloŝtonoj, inter kiuj ni estas vivopilgrimantoj. Nun estas vico mia por atingi la lastan. Ne estas kialo por rigardi antaŭen, restas nur tagoj, eble horoj destinitaj al mi... Tial mi rigardas nur retren...

*Tial mi petas Vin, Dio mia
Kiu donas al ni la panon bonan kaj vivoplenan
Nun malfermu la ĉielon
Kaj liveru al mi parton de Vi*

*Ebligu priplori niajn pekojn
Ke ni povu por ili penti
Dankegi al Vi por ĉio
Vin per la tuta koro ami*

Jes – nun mi nur retrorigardas malproksimen, tro malproksimen... En tiu ega malproksimo retroviĝas antaŭ mi bildoj kaj impresoj el miaj infanecaj jaroj sur la hungara korto.

Ankoraŭ antaŭ ol mi ekkonis vin, Premislo, kiel juneta kaj malsperta princineto, malgraŭ la gloro kaj brilo de via nomo, mi malamis vin, ĉar vi kaŭzis morton de mia plej ŝatata infan-amiko. Kvankam vi tion ne sciis, ne havis eĉ antaŭsenton pri tio...

Jánoŝ – pri li mi sciis ĉion! Sufiĉas fermi la okulojn kaj tuj mi vidas lin antaŭ mi – lian hararon, okulojn, rideton, mi sentas la odoron, kiu eliras el lia haŭto, tuŝojn de liaj manoj... Li estis amiko de miaj infanaĝaj ludoj, li instruis min rajdi ĉevalon, akompanis min ĉe la rajdado. Denove kaj denove mi petis miajn gepatrojn ke ili permesu lian akompan-ĉeeston.

Sed plej bele estis, se ni povis malaperi de la elrigardo de plenkreskuloj kaj ekstarti por ia aventuro. Tiam ni grimpadis en la fosejoj de la Buda burgo, enpenetradis en la subterajn, duone superŝutitajn koridorojn, kie ni „oran trezoron“ serĉis; aŭ ni subrampadis la junarbaran vegetaĵon kaj tie ni serĉis arbarajn feinojn.

Kaj iamfoje ... iamfoje, kiam ni degrimpis la arboplenan deklivon, al Danubo, mi glitis sur krutaĵo kaj en la lasta momento Jánoŝ kaptis min brakume. Lia spiro, subite alproksimiĝinta al miaj lipoj, ĉirkaŭblovis min per sia varmeco kaj ekflamigis mian

junecan korpon. Eble tio estis momento – aŭ eterno – sed poste revenigis min en la realon la ekfulmo de lia alrigardo, kiu sampempe kun mi ekkaptis ankaŭ la vizaĝon de iu, kiu kaŝis sin en la apuda arbustaro. La vizaĝo tujmomente malaperis, kaj mi denove perceptis la grundon sub miaj piedoj, la verdon de la foliaĵo, kaj Jánoŝ-on, kiu jam minutojn antaŭ lasis min el la brakoj kaj staris nun apude, en sia konate ĉiutaga aspekto.

Sed la duan tagon, kiam mi serĉis lin, li ne estis trovebla. Al la promeno akompanis min mia vartistino. Ni estis elirintaj la burĝan korton ĉirkaŭ la staloj – kaj jen tie – tie mi lin vidis! Li pendis kapalteren, la piedoj ligitaj al kejoj sur kiujn oni lokadis ĉeval-konjungilojn. Li estis nuda kaj inter la femuroj oscedis profunda sulko de sangvundo, ĝis la ventroduono. Ruĝaj streketoj estis fluantaj sur la brusto, kreis kadretojn sur la vizaĝo de l'mortinto kaj gutis surteren sub lia kapo. Jánoŝ! Jánoŝĉjo...!

Kelkajn tagojn mi kuŝis en febro. Kiam mi el ĝi reviviĝis, longan tempon mi volis vidi neniun. Ĉiun, kiu alproksimiĝis al mia lito, mi forpuŝis per angorplena krio, la kapon ŝovante sub la kusenon. Unusola, kiun mi toleris, estis la avo Bela. Nur lia alrigardo alparolis min; pacema, afabla, komprenplena – kaj tamen estis li, kiu ordonis Jánoŝ-on malhonorige murdi – pro sciigo fare de la maljuna vartistino, kiu nin en la arbustaro observis. Nur post kelka tempo mi ĉion eksciis – sed, mirinde, eĉ pro tiu fakto mi ne perdis la ŝatemon al la avo. Nek la vartistinon mi kulpigis. Mian malamegon mi transprenis al vi, Premislo, kiun mi ĝis nun ne konis – sed de kies kulpo – tiel mi la aferon sentis –

la terura murdo-krimo okazis. Se mi ne estus destinita fariĝi via reĝa edzino, neniu havus kialon malakcepti la amikecon kun Jánoš. Ĝis nun mi memoras, kion diris al mi – trankvile kaj prudentoplene – la avo Bela: „Ne strebution kompreni nun. Memoru nur, ke tio estis neceso. Poste vi ekkomprenos. Estas la malnova proverbo: „Se oni lasas du infanojn kunaj – poste oni trovos tri.“ Vi estas destinita por reĝa krono kaj trono – vole nevole de via flanko, kaj ni estas por vi respondecaj. Ĉion, kio stariĝus kontraŭ tiu celo, ni estas devigaj likvidi. La viro, al kiu vi devas edziniĝi, estas la plej potenca suvereno en la tuta mondo. Kaj vi nure havas du elektojn: aŭ la jenan viron – aŭ monaĥinejon.“ Tiel diris mia avo, kaj liaj vortoj destinis... De tiu tempo mi ĉesis baŭmi kaj akceptis... Sed longe, Premislo, mi ne povis pardoni al vi, ke vi estis nedirekta kaŭzo de Jánoš-a morto.

Hodiaŭ mi pardonas ĉion al ĉiuj kaj mi mem preĝe petas senkulpigon...

Ĉu – aŭskultinte tiun monologon, ni povus ne substreki la plej grandan teatro-prezenton de E.S. – nome la „Eliška Přemyslovna, královna česká“, kiun ni povis ĝui okaze de la UK en Prago, 1996. Arda proklamo – „mi estas la reĝino ĉeĥa“ sonis same fiere kiel „mi estas aktorino ĉeĥa“. Kaj ni estu fieraj, ke el la ĉeĥa esperanto-nesto eliris tia reprezentantino.

Aldonendas, ke pri la sukceso de teatraĵoj same meritis „ŝia dramaturgo“ Čestmír Vidman. Lian 100-jaran naskiĝtagon ni, praganoj, ne forgesu rememori venontjare je la 31.10. 2021. Sen tiuj amikoj mi ne povus skribi la rememoraĵojn.

Sed la programo kaj etoso de la menciita konferenco OSIEK en Kondoroŝ ne estas nura afero nepre mencienda. Pro naturaj kaj objektivaj kialoj la Organizaĵo estis oficiale nuligita post sia 34-jara ekzisto. Tio ja vere estis kortuŝa afero, ne sen larmoj en niaj okuloj. Ĝi postlasis grandiozan laboron por Esperanto: 6-foje en la jaro eldonata gazeto LA GAZETO kun bunta programo koncerne la literaturon kaj aŭtorojn, kaj ĉiujaran kunsidan traktadon en diversaj lokoj de la mondo (ni rememoru Wu-Ĥan, nun kun la afero de COVID-19). La lasta loko – KONDOROŜ - meritas specialan atenton kaj dankon de ĉiuj „osiekanoj“. En tiu negranda hungara urbo la konferenco okazis 3-foje! Ne demandu pri kialoj – sed mi scias, ke unu la plej grava estas tiu, ke en ĝi „nestas“ familio, kiu fariĝis motoro de la Organizaĵo. Dum la jaroj mi poŝtupe konatiĝis kun la personecoj, kiuj jam delonge estas konataj en la Esperantujo: Eugène de Zilah – la aŭtoro de famaj libroj (naskiĝinto en Kondoroŝ), lia edzino Lena de Zilah – instigantino kaj „ŝoforino“ de LA GAZETO (mortinta en 2009), iliaj hungaro-francaj geinfanoj kaj genepoj, genevoj, ktp. – inter ili estu nome menciita Pál KOSZUCH – la rekta organizanto de la konferenco. Pro la ekkono de la tuta familio „je la lasta momento“ por mi la movado de OSIEK fariĝis nedisigebla afero de mia vivo.

La urbeto mem meritas jenan gajan rimarkon. Hungaroj diras, ke – kvankam negrava, ĝi tamen estas konata de hungarnacianoj en la tuta mondo! Ili ĉiuj konas kaj kantadas la simplan melodian kanton pri la „Kondoroŝ-a ĉardo“. Jen la traduko de la kanteto:

Kondoroŝa ĉardo/belas, jen ver'.
Ĝin vizitas
cimbalisto/por cimbali ĉiu vesper'.
Jen dezir' de
ĉardistin'/ke tre baldaŭ la filin'/'
Iĝu edzin'.

(Rim.: Ne mia traduko)

Nenia geniaĵo, mi scias, sed ĝi evokas en mi plej varmajn rememorojn. Krom tio aludas komencon de la dua demando, je kiu mi volas respondi.

En nia OSIEK-kolektivo mi povis fiere anonci la „grandiozan“ eventon – la operon STERNENHOCH. Por min viziti kaj la operon ĝui mi surloke invitis la renoman muzikistinon en la Esperantujo nomatan Perla Miela (laŭvorta traduko de ŝia hungara nomo, kiun mi ne liveras).

Ad 2)

Kaj pere de la supra rimarko mi venas al la afero, pri kiu mi povas paroli kiel pri „la plej ĝojiga“ ... (kompreneble estis ankaŭ aliaj, sed se mi devas elekti, kaj samtempe certe kuninteresi la legantojn, do, sendube...).

Mi ĝuis la operon 5-foje; (kaj la 6-an malebligis la pandemia kvaranteno). Se oni supozas, ke estas ĝuste la „Esperanto-elemento“ kialo de mia entuziasmo, do ne plene jese mi povas aserti; la kerno estas la interesa muziko, kiu fariĝas neniam laciga, ĉiam impetiga; kaj la tuta aranĝo; kaj la komponisto Ivan Acher. Dum ĉiu prezentado li sidas ĉe sia „kapitana aparato“, mi ŝatas vidi lian rondan agrablan vizaĝon – kaj mi ĉiam iras lin saluti „en la nomo de esperantistoj“. Perla, la fakulino (en muziko, en Esperanto, en literaturo) esprimiĝis:

„Videblas, ke la komponisto ne estas esperantisto kaj ke la tradukisto ne estas muzikisto. Tamen mi estus malfeliĉa se mi ne estus spektinta la operon.“ Kaj ŝi kunprenis la programon por trakti la aferon inter siaj budapeŝtaj gekolegoj. Ĝuste tio ĝojigu nin: ke tiel NEATENDITE falis al ni „la sukceso“ (kvankam aktuale ni por tio aktive ne propagandis). Sed la afero maturiĝis kaj donis rikolton – **ĉar la hazardo favoras la preparitajn...**

Kaj ni estu fieraj, feliĉaj, kaj al Mirek Malovec dankplenaj, ke li estas kapabla ĉiumomente (ne nur en ĉi menciita) reprezenti nian movadon. Ĉu povas esti iom pli ĝojiga ol havi tiajn homojn por samideanoj??

Ad3)

La „kabeo“ de Jaroslav Krolupper...

Estimata sinjoro redaktoro, mi dankas por la demandoj, kiujn mi sciis kaj povis respondi sen hezito. Laŭ mia konscio mi elektis bone la splitaĵojn el mia 50-jara esperanta vivo.

Margit Turková, „jubileantino“ je la 26.9.2019

Strato de Ivan Blatný en Anglio

Ĉeĥa poeto kaj esperantisto Ivan Blatný (1919-1990) estis honorita per propra strato en Anglio, kie li vivis kaj mortis. Sur foto kiel 13-jara knabo kun J. V. Šamla, kiam ili aktivis en Verda Stacio 1933.



BOŽENA NĚMCOVÁ (* 10. 2. 1820 - † 21. 1. 1862)

kaj mi

Mi dezirus naskiĝi post 200-jaroj... sopiris nia martirita nacia heroino.

Jes – ĉijara jubileo kaj jubilado abundis; kiom ofta sorto de naciaj granduloj, kiujn „ni“ iam turmentigis – kaj nun elstarigas...



Do, mi partoprenis la omaĝ-renkontiĝon, preskaŭ konferencon pri Božena Němcová. Ĝin okazigis (4.2.) Památník Národního Pisemnictví en baroka „salono Božena Němcová“, Strahov. Kiam la oficialuloj de la Rememorejo de

B. N. en Česká Skalice omaĝis la verkistinon ĉe ŝia tombo en la tombejo Slavín (Vyšehrad), pleniĝis la salonego je fakuloj kaj gastoj kaj ŝatantoj. La temo estis pritraktita (en prelegoj, diskutoj) de ĉiuj flankoj, oni povus diri „de ĉiuj konataj“...

Sed tamen ne: mi elstaris kaj antaŭ la aŭditorio mi proklamis ion neniam sciitan – en tiu ĉi momento nekredeblan: *Mi travivis mian infanaĝon en la sama ĉambro kiel Božena Němcová... Al la „gapuloj“ mi klarigis: Estis tio en Slovakio, kaj estis tio 85 jaroj post Ŝi...*


Mi naskiĝis (1939) en la vilaĝo submontara, kiun B. N. vizitis ĉe sia restado en Slovakio (1853-54), nome en la distrikto Brezno nad Hronom, en kiu kuŝas la vilaĝo, kie B. N. kelkaj tagojn loĝis, kolektis la etnografiaĵojn, kiujn ŝi prilaboris kaj publikigis (ekz. por la rakonto „Chyže pod horami“ ŝi trovis

inspiron en nia „ligna vilaĝo“). Doktoro Laskomierský el Brezno, amiko al B. N., trovis por ŝi loĝejon en la domo de mia pra-pra-pra onklino, kie mi post jam mencitaj 85 jaroj estis vartata.

La informo estis surpriza ankaŭ por la fakuloj, kiuj okupiĝas pri B. N. Ankaŭ mi eksciis tion nur eble antaŭ 15 jaroj, kiam slovaka etnografoj kaptis tiun gravan aferon, publikis ĝin kaj sur la lignan domon instaligis koncernan memortabuleton.

(Rim.: Longajn jarojn, pro mia emo legi kaj verketi, nomas min „nia B. N.“ Nur nun mi ekkonsciis, ke mi infanec-aĝe eble spiris la nemorteban „genius loci“ ...).

Margit Turková



Amikumu

La estonteco de Amikumu dependas de vi kaj la komunumo. Se ni ekhavas 500 novajn orajn membrojn ĉi-monate, ni povas daŭre funkciigi Amikumu kaj ni jam estas 10% tien! Ĉu ni povas dependi de vi por helpi al ni atingi nian celon kaj daŭrigi Amikumu longe en la estonteco? Tiel vi ĉiam povos trovi proksimajn esperantistojn ie ajn en la mondo!

<https://app.amikumu.com/origu>

Amikume via

Chuck Smith

ZLATKO TIŠLJAR, PAJO (1945-2020)

UEA kun granda bedaŭro informas pri la forpaso de Zlatko TIŠLJAR (1945-2020), la 8-an de septembro en Zagrebo. Komence de aŭgusto la Komitato de UEA elektis Zlatkon TIŠLJAR kiel **Honoran Membron** de la Asocio, dum la unua reta kunsido de sia Ĝenerala Kunveno, kadre de la Virtuala Kongreso de Esperanto (VK).

Zlatko TIŠLJAR, naskiĝinta la 19-an de majo 1945, forpasis 75-jaraĝa. Ekde 1962 li aktive kaj modele sin dediĉis al Esperanto, unue ĉirkaŭ Zagrebo kaj en la studentaj kaj junularaj rondoj, laborinte surkampe de TEJO, kaj ankoraŭ freŝe ĉi-jare, internacie, ĉefe en la eŭropa kontinento. Lian imponan biografion eblas koni ĉe nia gazetara komuniko pri lia honora membriĝo (uea.org/gk/898) aŭ ĉe la artikolo pri li en Vikipedio:

(eo.wikipedia.org/wiki/Zlatko_Tiŝljär).

Pajo, kiel li estas konata inter esperantistoj, estis por ĉiuj ni unu el la grandaj aktivuloj de nia movado. Laŭ amikoj de la tuta mondo, li estis ekzemplo de esperantista personeco, homo, kiu plene reprezentis la idealojn de esperantismo: scivolema, bonkora, malferma, laborema, helpema, diligenta. Elstara esperantisto, li impresis pro siaj entuziasmo, firmeco kaj vigleco. Instruisto konata de miloj da lernintoj, preleganto konata de miloj da kolegoj, li estas memorata pro sia talento, klareco kaj parolmaniero, flua kaj eleganta. Li vere laboris por Esperanto ĝis mallonga tempo antaŭ sia forpaso, kiun la movado

taksas kiel grandan perdon. UEA kuraĝigas al ĉiuj, ke oni strebu inspiriĝi de lia agado, plu laborante por nia Afero kaj honorigante la ekzemplon, kiun li lasas al ni. Nome de la tutmonda komunumo ni prezentas nian kondolencon al la familio kaj al la multaj geamikoj de Pajo tra la mondo.

*Gazetara komuniko de UEA, n-ro 905
foto el Vikipedio*



Zlatko Tišljär verkis 90 publikaĵojn, inter kiuj elstaras lia **Zagreba metodo**, lernolibro por gejunuloj, kaj jenaj verkoj:

- **Frekvencmorfemaro de parolata Esperanto**. (1981, 41 paĝoj) – Komputila esploro pri 1343 morfemoj.
- **Esperanto-kroatserba poŝvortaro** (1983, 65 paĝoj, 4300 radikoj)
- **Instrukciaro. Por kursgvidantoj uzantaj la Zagreban Metodon**. (1989, 55 paĝoj)
- **Duobla spiralo** (1991, 132 paĝoj) – Libro celanta "helpi adoleskantojn por pli facile orientiĝi en la mondo".
- **Esperanto vivos malgraŭ la esperantistoj** (1997, 177 paĝoj) – Artikoloj, eseoj, studoj.
- **Eŭropa ideologio** (1998, 68 paĝoj) – Pensoj pri eŭropaj konscio kaj identeco.
- **Eŭropa identeco** aperis papere en 1998, elektronike (pdf) en 2001
- **Esperanto-slovena vortaro / Slovena-Esperanta vortaro** (kune kun Aleksander Heřman, 1999, 111 paĝoj, 5000 vortoj en ĉiu direkto)
- **Eŭropo, vi baldaŭ mortos!** (2005, 62 paĝoj) – Analizo de la nuna eŭropa lingva politiko, kun rigardo al la estinteco kaj la estonteco.
- **Ekzistado**. Kibernetika Klarigo de la Mondo, Zagrebo (2012, 80 paĝoj)
- **Nekutime pri multio** (2015) – Kolekto de 80 eseoj pri ok temoj
- **La Zagreba metodo** – Zlatko Tišljär – Esperanto (filmo)
- **Lingvo kaj identeco** – Zlatko Tišljär – Esperanto (filmo)

Laŭ Gazetara komuniko de UEA, n-ro 898

Esperanto-movado en la urbo Přelouč

kaj ĝiaj iniciatintoj

JUDr. Josef Fousek kaj Karel František Ludvík

Se ni volas priparoli evoluon de Esperanto-movado kaj aktivecoj de E-rondeto en orientbohemia urbeto Přelouč, ni baldaŭ ekscios, ke ĝi ne havas ĉiflanke tre longan tradicion.



En la prezentata artikolo ni orientiĝos al la periodo de la komenco de la 20-a jarcento. Tiam ni ankoraŭ rimarkas pli vastan agadon sur la kampo de ĉi tiu interesa internacia lingvo kaj

ankaŭ pro ĝiaj gravaj iniciatintoj, precipe pro la ĝis nun preteratentita grava esperantisto **Josef Fousek**. Laboron multe komplikas la fakto, ke la arkiva fonduso de ĉi tiu E-rondeto fakte ne ekzistas. Tial ni dependas nur de hazarde konservitaj informoj. La plua kialo estas fakto, ke esperanto estis kreita en 1887, do en la tempo, kiu interesas nin, ĝi estis tre juna lingvo.

En 1909 estis fondita E-rondeto en la proksima urbo Pardubice. Ĝia fondinto estis d-ro Stanislav Schulhof. En publikaĵo eldonita okaze de la centjara jubileo de la menciita E-rondeto, oni deklaras, ke inter la unuaj membroj estis ankaŭ JUDr. Josef Fousek el Přelouč. Li certe aktivis en ĉi tiu rondeto antaŭ 1913. Ŝajne eblas, ke estis li mem, kiu provokis antaŭ la mondmilito intereson pri Esperanto en Přelouč.

Ni alproksimigu, almenaŭ mallonge, la interesan kaj edukitan personecon de JUDr. Josef Fousek (9.8.1881-2.9.1973). Unue ni komencu per liaj agadoj ekster Esperanto. Li naskiĝis en Hostim (nun

parto de la urbo Beroun, Mezbohemia regiono) kaj mortis en seniorhejmo en Přelouč. Li vivis ĝis respektinda aĝo de 92 jaroj. Lia edzino estis Marie Fousková. D-ro Fousek laboris en Přelouč de majo 1919 kiel advokato kaj ankaŭ aktivis en diversaj lokaj asocioj. Li estis registrita kiel afergvidanto de la asocio Občanská beseda. En 1925 li estis elektita kiel membro de la Urba Konsilo. Li verŝajne vivis parton de sia vivo en la domo n-ro 31 en la strato Sladovní, do en la centro de la urbo mem.

En sia libera tempo li interesiĝis pri muziko, korusa kantado kaj orkestra muziko. De 1920 li gvidis la lokan Asocion de Kantado kaj Muziko. Sekve, en 1921, li fariĝis la unua korusmajstro de la nove formita koruso de "Josef Bohuslav Foerster". En la sekvaj jardekoj d-ro Fousek gvidis ĉi tiun koruson kontinue en diversaj periodoj, konkrete en la jaroj 1920-1925, 1930-1934, 1936-1941 kaj 1949-1959, kaj ankaŭ funkciis kiel ĝia prezidanto. Krome, li ankaŭ gvidtis fine de 1952 la viran parton de la kantkoruso de „Ĉeĥoslovaka eklezio“ en Přelouč.

D-ro Fousek ankaŭ ludis arĉ-instrumentojn. Oni preparis ceremonian senvualigon de memorplako de d-ro Ladislav Quis sur la domo n-ro 25, en aktuala Masaryk-placo. Quis estis ĉeĥa verkisto, poeto, advokato, ĵurnalisto, tradukisto, literatura historiisto kaj kritikisto. La 26-an de septembro 1925 antaŭvespere d-ro Fousek prezentis Arĉan kvarteton de A. Dvořák en F-maĵoro, specife la 3-an frazon.

Li estis de 1927 membro de la „Filharmonia Orkestro de Přelouč“, kiun li gvidis kiel estro dum ĝia ekzisto (1927-1951). Li ludis la aldviolon kaj en 1931 funkciis eĉ kiel dirigento. En 1951 Fousek atestis la likvidadon de la asocio „Občanská beseda“ kaj ankaŭ de la Filharmonio de Přelouč. Li estis aktiva eĉ dum progresinta aĝo. En 1964 li verkis aldonajn informojn pri la historio de la Filharmonio de Přelouč. En 1950 li devis fini sian juran praktikon. Tiutempe li estis jam 69-jara pensiulo kaj perdo de profesia laborloko ne plu estis por li tiom grava problemo.


Nun ni revenu al E-movado en Přelouč. Laŭ disponeblaj informoj kurso de Esperanto (historie la unua kurso) komenciĝis en ĉi tiu urbo en 1912 kaj finiĝis en 1913. Tiam la 16-an de februaro okazis varba prelego de d-ro Fousek kaj d-ro Schulhof. Partoprenis 60 aŭskultantoj. Kvin semajnojn antaŭ murdo de František Ferdinand d'Este okazis la 21-an de majo 1914 en la urbo Přelouč kongreso de orientbohemiaj esperantistoj. Alveturis entute 52 partoprenantoj. La kongreson inaŭguris estro de la loka E-rondeto s-ro Adolf Vosáhlo. Laŭ la foto konservita en kolektoj de muzeo en Přelouč (kiun ni prezentas ĉi-sube), ni ekscias, ke ĝi estis la 7-a Kongreso de Esperanto.



Sur ĉi tiu multkapa foto prenita sur nespecifita loko en Přelouč, ni vidas ĉirkaŭ 25 virinojn kaj pli ol tridek virojn. Laŭ tiama kutimo estas en la suba vico sur la tabulo pli preciza informo. En la sama vico en la hela ĉapelo sidas K. F. Ludvík, pri kiu ni priskribos kelkajn detalaĵojn en la artikolo iom poste. El la apudskribo de la foto ni certigas, ke ĉi tiun kongreson organizis mem d-ro. Fousek. Laŭ la partoprenlisto de ĉi tiu kongreso, resp. de ĝia parto, ni povas legi, ke la partoprenantoj alveturis el la urboj Kutná Hora, Pardubice, Přelouč, Prago, Nymburk, Chrudim, Hradec Králové ktp. Oni povas konstati, ke ĉi tiu kongreso certe estis grava evento ne nur por lokaj esperantistoj.

Dum la 1-a mondmilito estis la agadoj de la E-rondo Přelouč tre limigitaj. Dr. Schulhof kaj lia bona amiko d-ro Fousek nur reciproke korespondis. Ni ne scias, ĝis kiu grado la E-rondeto restartis sian aktivecon post 1918. Tamen la intereso pri Esperanto en Přelouč ne tute ĉesis. Laŭ la kroniko de Přelouč estas skribite, ke tajpilisto J. Ludvík partoprenis la 12-an de decembro 1920 kunvenon de E-iniciatintoj en la urbo Červený Kostelec. Tre verŝajne li fakte estis Karel František Ludvík (1885-1944), kiu estis „viro de multaj metioj“. Li estis trejnita kiel presa tajpilisto kaj poligrafo, violonisto, pentristo kaj vojaĝanto.

De 1924 ĝis 1934 li loĝis en Addis-Abeba en Abisinio, nuna Etiopio. Ni scias, ke li ankaŭ interesiĝis pri Esperanto, sed ni ne plu scias detalojn. Tamen ekzistas lia foto kun la Esperanta stelo en kolektoj de la muzeo Přelouč.



Iom post 1900 li eldonis kune kun la jam menciita Adolf Vosáhlo la publikaĵon: Ĉesko-esperantské rozmluvy (Ĉeĥa-Esperanta konversacio).

Intereso de d-ro Fousek pri Esperanto nek ĉesis eĉ tiutempe, kiam la E-rondo en Přelouč verŝajne ne plu funkciis. Ni scias, ke li partoprenis tradukadon de la grava verko Ĉeĥoslovaka Antologio (1935), kiu celis, ke la ĉeĥa literaturo estu alirebla en ĉi tiu internacia lingvo. Li interesiĝis pri la lingvo eĉ post 1945. Kelkfoje li kombinis sian ŝatokupon en Esperanto kun muziko – ni scias, ke ekzemple la 7-an de aŭgusto 1951 li ludis enkadre de la Somera E-Lernejo en Doksy apud Lago de Mácha kiel membro de arĉa kvarteto kaj kompletigis en ĉi tiu somera lernejo improvizan koruson. En la 1960-aj jaroj estis lia multjara laboro por esperanto premiita dufoje – unue en 1965, kiam li ricevis diplomon de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato. En 1969 li fariĝis (kiel 88-jara) honora membro de la nove fondita Ĉeĥa Esperanto-Asocio. D-ro Fousek ŝajne partoprenis ankaŭ kunvenon de orientbohemiaj esperantistoj en Pardubice kiel reprezentanto de la E-rondeto de Přelouč (en junio 1947), E-renkontiĝon en Hradec Králové (en marto 1948), kaj E-konferencon en Prago (en aprilo 1948).

Inĝ. Jan Závodský, CSc. (* 1945), origine la civitano devenanta el Přelouč, aktivulo en la praga filio de Klubo de Amikoj de Pardubice-regiono, kiel la infano konis d-ron Fousek, ĉar liaj gepatroj amikiĝis kun li. Jan Závodský sciigis al la aŭtoro de ĉi tiu artikolo en decembro 2019, ke Fousek korespondis kun sia amiko (advokato el Hradec Králové). Eblas, ke ili uzis kaj Esperanton kaj la ĉeĥan lingvon. Same li

korespondis ankaŭ kun la brazila prezidento Kubitschek (1902-1976), kies patrino devenis el Bohemio. Kubitschek, prezidentis dum 1956-1961. D-ro Fousek tiam laŭdire loĝis en Přelouč en la domo n-ro 21 en la nuna Pražská-strato, kie li havis advokatan oficejon. Li laŭdire estis unu el la unuaj Přelouč-civitanoj, kiuj posedis radioaparaton.

El la dokumentoj de la arkivo de la Klubo de esperantistoj en Brno zorgata de s-ro Miroslav Malovec, videblas, ke d-ro Fousek kunlaboris je projekto de esperantigo de kelkaj ĉeĥaj operoj – aŭ pli precize – li helpis muzike. La traduklaborojn faris d-ro Tomáš Pumpr (1906-1972). Ili estis operoj „En la puto“ de Vilém Blodek, „Najado“ de Antonín Dvořák kaj „Vendita fianĉino“ de Bedřich Smetana. Ĉi tiuj verkoj estis prezentataj en la E-elsendo de Verda Stacio pere de Radioĵurnalo Brno, resp. Prago en 1938, 1946, 1949 kaj 1950.

Fousek ankaŭ esperantigis: Kanton de Záviš n-ro 5 de Rudolf Friml sub la titolo Dum kara nokto, la kanton de Beethoven „Al la malproksima amato“ (germane: An die ferne Geliebte) aŭ kantojn de Karel Hašler k.s. Li ankaŭ verkis plurajn ĉeĥajn pripensojn pri Esperanto en la revuo Esperantisto.

La arkivo Brno enhavas ankaŭ parton de la korespondado de J. Fousek de la jaroj 1920-1934 kun la franca, relative grava, esperantistino Alice Sergeant (1882-1934).

En la artikolo publikigita en 1951 en la revuo Esperantisto okaze de la 70-a naskiĝtago de d-ro Fousek oni ekzemple ankaŭ skribas, ke li dediĉis sin al Esperanto ekde 1907 kaj inter la mondmilitoj li aktive partoprenis laborkonferencojn de orientbohemiaj esperantistoj.

Ŝajne dum ĉi tiuj aranĝoj li kantis Esperantajn kantojn "per sia kultivita vira voĉo", kiujn li mem ofte verkis aŭ tradukis. Li ankaŭ estis "erudicia spertulo pri muzikologio" kaj dank' al tio li kapablis helpi pri ĉi-supraj operoj.

Esperanto al Přelouč en la antaŭnelonga pasinteco fine revenis. La seminariojn gvidis spertaj esperantistoj Jarmila Rýznarová kaj Josef Vaněček. Dum lerneja jaro kunvenadis kutime meze de la monato ĉiam sabate antaŭtagmeze 10-20 gelernantoj. La celo de la seminarioj estis, ke la partoprenantoj, kiuj ĝis nun havis nur pasivan scion pri esperanto, lernu paroli ĝin flue.

Ni ne scias, ĉu rekte en Přelouč nun vivas iu aktiva esperantisto. Tamen proksime de Přelouč (en la vilaĝo Strašov) vivas Ing. Josef Kříž (*1943). Li prezentis la 11-an de aprilo 2017 en Přelouč prelegon „Od zhroucení Babylonské věže k mezinárodnímu jazyku esperanto ("De la disfalo de la mita Babelturo ĝis la internacia lingvo Esperanto") okaze de la centjariĝo de morto de la kreinto de esperanto d-ro Zamenhof (1859-1917). S-ro Kříž komencis lerni fremdajn lingvojn en 1953 (la rusan). Pli malfrue li daŭrigis lerni laŭgrade la germanan, la anglan kaj la francan. Li devenas el Strašov. Post diplomiĝo li foriris en la urbon Ústí nad Labem, kie li laboris. Tie en 1975/76 li eklernis Esperanton kaj aktivis en tiea E-klubo, kiun li 10 jarojn (dum 1988-1997) gvidis. Li vizitadis diversajn E-seminariojn ne nur en nia lando, sed ankaŭ eksterlande, precipe en Germanio, dum kiuj li ofte prelegis. De 1995 li havas koncesion por instrui Esperanton. Post pli ol 40 jaroj li revenis al Strašov en 2009 kiel pensiulo. Ekde 2019, li verkas artikolojn por la Espe-

ranta revuo "La Bulteneto", kies redakcio estas en Vieno.

La ĉeĥan version verkis Matěj Pešta, muzeisto kaj historiisto de Přelouč.

(esperantigis Josef Kříž)

KLUBA VIVO Brno

Estis nuligita klubejo en la strato Starobrněnská, ekde septembro 2020 la klubo renkotiĝas en nova klubejo, strato **Křenová 57**, ne merkrede, sed **MARDE** inter 18-19 h.



Antaŭ unu jaro, la 7-an de oktobro 2019, forpasis en azila domo en Zruč nad Sázavou nia membro **František Frýbert** (naskiĝis 17.9.1929), fama precipe inter radio-amatoroj.



Antaŭ 20 jaroj mortis d-ro ing. **Jaromír Šikula** (1924-2000), botanikisto, universitata pedagogo, ofte aperanta en televido kaj radio, nia membro kaj preleganto en la klubaj programoj pri la naturo, medicino, filozofio. Ofte li enkondukis artistojn ĉe klubaj koncertoj.

Virtuala IJK

Ankaŭ la junulara kongreso ĉi-jare okazis nur virtuale, sed kun ĉiuj tradiciaj programoj. Plie, ĝiaj 316 partoprenantoj el 52 landoj superis la antaŭajn kongresojn, aperis eĉ landoj, kiuj ĝis nun ne estis reprezentitaj, ekz. Filipinoj. Pozitive estas, ke TEJO devis trovi novajn metodojn kiel veki intereson de junaj esperantistoj kaj amuzi ilin.

ADRESATO-LAŬDACIO

Al

100-jara jubileo de Eva SEEMANNOVÁ

(21. 3. 1920 – 21. 1. 1999)

Kara, estimata samideanino, dum multaj jaroj Vi disdonadis al ni donacigojn, kiuj kortuŝadis niajn korojn kaj niajn pensojn. Nun, okaze de Via jubileo, ni, kiuj amas kaj estimas Vin, donas donaceton en formo de niaj vortoj...



Antaŭdiro de Margit Turková:

Hodiaŭ jam neniu estas kapabla amasigi nombron da prezentadoj kiel estus kutime kaj dece okaze de la jubileo de nia grandulino, ni nur substreku, ke

ili estis diversformaj, kiel oni devas supozi ĉe la virino tiel vigla, kiel Eva estis. Nur tion taŭgas diri, ke la (imaginara) listo enhavas teatraĵojn prezentitajn sur la podiumoj enlandaj kaj eksterlandaj (en la ĉeĥa kaj en Esperanto), "partituroj-tradukaĵoj" el ŝia mano, kaj precipe volumojn de poemoj (nialingvaj kaj Esperantaj, transprenitaj kaj propraj kreaĵoj), ĉar ŝi "disŝiris" sian koron je du samaj partoj: teatro kaj poezio. Ni partoprenis en ŝia vivo privata, kaj precipe kunĝuis ŝian vivon artkoncernan, do ni sentas, ke la bukedeto el niaj varmaj kaj sinceraj kaj amplenaj vortoj estas al ŝi pli belodora ol la "seka kalkulado".

Admirpoemo de Eli Urbanová:

Kiam Vi larmojn verŝas.

*Unue la impresoj
de ege belaj kruroj.
Mi ĵurus, ke al ili
fiksiĝis la okuloj.
Detaloj: Harlinio.
Ŝanĝema bril' de l'broĉo.
Kaj tamen tre, tre baldaŭ
nenio - nur la voĉo.*

*Via ton' tragedia!
Iu poŝtukon serĉas.
Ĉar estas vi unika,
kiam vi larmojn verŝas...
Jes, Eva, al vi rozojn!
Bukedon grandan, sciuj!
Kaj al la kor' vin premi
kaj danki de ni ĉiuj.*

Jen – unu ĉarma virino laŭdas la ĉarmcon de la alia. Kaj Eli scias, pri kiu paroli! Eble la plej valoran juvelon, kiu Eva havis en si - kaj abunde disdonadis – povis plensenteme akcepti nur ni, virinoj. Ja – multfoje, kiam Eva ludis en nia loĝejo (U Turků, en Obořistě) ni "serĉis poŝtukon"...

Laŭd-esprimo de Helena Štruncová:

*Eva - virino fragila, lanuge malpeza,
okuloj malhelaj, pasie brilantaj, kun
neatendita energio - jen ŝi.*

*Ŝi ja ne havis aĝon. Foje Avineto, foje
Poezio, aliffoje junulino - kiom da roloj,
tiom da diversaj estaĵoj.*

*Interne ĉiam la sama: fidela ĉeĥa
patriotino, neniam hezitanta pri la fina
venko de amata Esperanto, sindone hel-
panta tiun ĉi noblan celon...*

... kaj de Ota Dub (ĉeĥa verkisto):

Eva Seemannová estas neordinara artistino. Multspeca, multfake larĝa kaj profunda. Tradukantino, dramaturgino, belartistino, reĝisorino kaj aktorino, deklamistino, interpretantino de prozaj kaj poeziaj tekstoj, senlaca vojaĝantino, instruistino...

Pri la vojaĝoj de Eva aludas jena rememoro de Mees Dee el Nederlando:

Eva Seemannová estas bonega artistino, kiu dum la Faulhaber-semajnfino, en 1981, brile aktoris la unuaktaĵojn kaj poemaĵojn de Valdemar Vinař, Eli Urbanová, Rudolf Hromada kaj František Lazecký. Ni ĉiuj vere ĝuegis ŝiajn prezentadojn...

Kiom da vivoj ni vivis kun Eva sur la podiumo. Sed kiu kapablas kunvivi ŝian personan, intiman vivon?! Neniu, krom ŝi mem! Kion ŝi travivadis en la intimeco de sia propra koro, tion ni tamen povas "spekti" en la konfeso, la poemo nomita

Teatro estas mia viv'

*Disŝovis sin kurteno velurmola,
per hela lum' radias reflektor',
malplenas la scenejo, nur mi solas
sur ĝia mez', kun premo en la kor'.
Nenies mov', nenies flustro ĝena;
sole atent' el ombro de l' spektej'
alcelas min - trankvilan kaj solenan;
sed nur laŭ ŝajn', en ver' - streĉitan plej.*

*Je kiu foj' - ĉu centa, aŭ ĉu mila
mi staras en la disko de la lum'?
Kaj kio min atendas?
Ĉu jubila aplaŭdo, aŭ ĉu moka
siblopun'?*

*Teatra viv' ne estas ja edeno,
kapricas do la geaktora sort',
fojfoje ĝoj' miksiĝas kun ĉagreno,*

en konsonanc' ekgrincas foje kord'!

*Sed, ĉu la sun' radias sur ĉielo,
ĉu nigras nub', ni kun la sama ard'
servadas en la templo de la Belo,
gardante sanktan fajron de la Art'!
Obee al la plaĉ' kaj la deziro,
obee al decido de l' destin',
fidelaj ĝis la lasta vivospiro,
sur la posten' ni staras - ĝis la fin'.*

*Ĉu miri do, ke antaŭ vi mi staras
en rola poz'? Ja tuta mia viv'
estis sopir' je altenflug' ikara,
kaj ŝvebo en la regno de fiktiv'.
Al la teatr' mi ĉiam nostalgiis
kiel virin' al la unua am',
en ĝia spac' mi pli libere spiris,
pli pulsas kor', pli flagris sentoflam'.*

*Sur la rolej' mi en angoro tremis,
ploris en trist', suferis pro sopir',
jen gajis mi, jen malespere ĝemis,
flamis pro am', ekstazis en admir'.
Cent maskojn ja mi portis sur vizaĝo:
maskojn de gaj', ĵaluzo kaj sufer',
de amdezir', angoro aŭ kuraĝo,
humila trist' aŭ orgojla fier'.
Virinoj cent en mia memo nestis,
rakontis pri si mem en ĉiu scen',
per miaj mov' kaj voĉ' sin manifestis
ilia ĝoj' aŭ ilia ĉagren'.*


*En tromp' deloga pasie tentis Lea,
tremis Julieta en brakoj de Romeo,
Eliza ŝprucis per kriaĵ vortoj sakraj,
Avinjo milde obeis al la sorto
en plena fid' je dia mizerikordo,
Dolores flame kontraŭ milito plendis,
sed al ĝi fine la lastan filon sendis.
Atestis tiel varia vic' virina
sur la scenejoj, en helo ilumina.*

La Poeto Jiří Karen

Omaĝe al Lia 100-jara jubileo (11.6.1920 – 30.4.2000)

Rememoroj de Margit Turková

Jen - nia poeto Jiří Karen... Fakte ne! Li naskiĝis en Litomyšl kiel Ladislav Podmele... Kiel mi konas lian vivon de la komenco (el lia rakonto) ĝis la fino (adiaŭo), mi opinias, ke al li pli taŭgus esti Ladislav Podlesný – ĉar li fakte sian junecon travivis en la vilaĝo Podlesí - kaj la pseudonomo "Podlesný" sonas kaj trafe, kaj bele, kaj digne – por la ĉeĥa verkisto. Sed Ladislav enŝatiĝis al **Jiří Wolker** (mi ankaŭ) kaj "enamiĝis" al Anna **Karenina**... Tial lia artnomo sonas iom pompe, sed bele, ĉar ni kutimis en ĝi vidi la viron elegantan, belan, agrablan kaj bonkoran.



Mi povus aldoni ankoraŭ kelkajn pozitivajn epitetojn por mildigi mian "amikec-mokecon". Sed ne bezonas mi tion fari – la poeton bone konis la kunloĝantoj kaj liaj gekolegoj. Por ili Jiří K. multfoje organizis

literaturajn kunsidojn, dum kiuj havis ili okazon prezenti siajn verketojn. Li estis amiko favorkora, senĵaluze li propagis la tutan ĉeĥan poezi-sferon. Ne forgesis tion la kultur-oficistoj de la kvartalo Praha-Malešice. Antaŭ du jaroj ili organizis eĉ du! kunsidoj omaĝe al Jiří Karen! Mi estis invitita kaj recitis kelkajn poemojn de J. K. tradukitajn en Esperanton. Ĉar la organizantoj pritraktis serioze ankaŭ la esperantecon de Jiří...

Ĉe tiu okazo mi klarigis, ke en la ĉirkaŭo vivis ankaŭ aliaj famuloj, verkistoj, esperantistoj, kiuj estis amikoj al Jiří K.

František Kožík - pri lia esperanto agado ili sciis nenion, des malpli pri Josef Rumler, kiu estis redaktoro (kaj redaktisto) en Československý spisovatel.

Nek pri Čestmír Vidman. Nek multe sciis tiurilate Alena Kožíková, la filino de la verkisto. Mi klopodis sciigi ŝin ĉi koncerne - kaj ne restis tio sen rezulto: en la nuntempa jubilea ekspozicio omaĝe al František Kožík, en Rajhrad, estas la temo Kožík - Esperanto sufiĉe pritraktita.

Por la persona konatiĝo kun la nomitaj, kun multegaj nenomitaj, mi dankas al kara amiko Jiří!

La diligentulo, neniam li perdis tempon, eĉ dum promenoj li havis la kapon "enŝovitan" en iun libron. Li multe promenis (rekomende pro kormal-sano), precipe en la parko "Na Třeběšíně" (kiun vi vidu sur la foto). Ĉar – poeto, ofte li ekhaltis por noti la naskitan ideon... Jena "anekdoto" proksimigu la situacion, kelkfoje humuran. Per liaj propraj vortoj: *Mi trairas la straton, kie oni ion konstruas, kaj tuj alkuras al mi homo, kaj krias: "Se vi pensas, ke mi konstruas sen rajtigilo, vi eraras, ĉi tie mi havas oficialan permeson."* Aŭ mi estis alparolita ĉi-maniere: *"Ho, finfine iu interesiĝas pri la forfalaĵoj sur nia strato. Kiam vi ordonos ilin forigi?"* Aŭ min renkontas infano, infaneto; li enrigardas, kiel mi skribas en la notkajreton, kaj demandas: *"Kion vi faras?" / "Ĉu vi bezonas tion scii?" / "Nepre!" / "Mi skribas poemon" / Li alrigardas al mi kun malrespekto, frapas sin per fingro sur la frunton kaj diras: "Mi ja bedaŭras vin," kaj foriras...*



Nun la parko nomiĝas:
Park Jiřího Karena.

Kiam mi prepariĝis por partopreni la kunsidon omaĝe al la geedzoj Jiří&Zuzana, mi havis emon komplete kompreni la "poetan animon" de J. K. Nur tiam mi kalkulis de li verkitajn volumetojn (la prozaĵojn ne) – kaj en la "preparsemajno" mi tralegis ĉiujn 27! Kiam mi diris tion antaŭ lia filo Ladislav, kiu ankaŭ partoprenis, li ne povis kompreni, kion "ni vidas" en la poemaĵoj. Li ja multfoje ĉeestis la "kreo-krizon" de sia patro...

Sed mi en la verkaro de J. K. trovis multajn gravajn, socio-, literaturo-, arto-koncernajn ideojn, ofte kongruigajn, ofte kreo-originalajn. Estas antaŭ mi denove la defio – pliprofundigi mian konatecon kun Jiří Karen (ĉar kun Ladislav Podmele tio jam ne eblas).

Je la 1-a de aŭgusto, 2020



La parko troviĝas ĉe Trebešín.


JUBILEANTOJ DE JULIO, AŬGUSTO KAJ SEPTEMBRO 2020

František Benák, Tábor
Jindřiška Dubinová, Nymburk
Bohuslav Dvořák, Pardubice
MVDr. Oldřich A. Fischer, Brno
Stanislav Franc, Pardubice
Jindřich Havlík, Praha
Ing. Jan Janoud, České Budějovice
Ing. Josef Krob, Kladno
Jaroslava Kůrová, Příbram
Miroslava Marešová, Praha
Josef Mašek, Petrovice
Mgr. Václav Pospíšil, Semily
František Szappanczik, Velké Svatoňovice
Miroslava Tomečková, České Budějovice
Libuše Trojanová, Brno
Blanka Vejšická, Březnice

Al ĉiuj jubileantoj ni deziras ĉefe sanon, bonhumoron kaj ĉion nur favoran.

UNESKO eldonis unuan libron en Esperanto

DE IDEOJ AL AGOJ: 70 JAROJ DE UNESKO



Ekde 2017 aperas, kunlabore kun UEA, Unesco-kuriero, kiu vekas intereson de esperantistoj pri Unesco kaj de Unesco pri Esperanto. Nova rezulto de la kunlaboro estas la prezentata libro pri historio de Unesco, paralele Esperanta-ĉina. La libro havas 230 kolorajn paĝojn de formato 220x210 mm kun abundaj bildoj sur kuproplataj paperoj, kaj kum malmola kovrilo.

Jak platit svazu

Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 36 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010, variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vrat. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:

(ukončení variabilního symbolu)

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio
- 80500** virtuální *adresa@esperanto.cz*

Předplatné časopisů

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, polnickypavel@seznam.cz, tel. **723 672 335**. Předplatné uhradte na účet u **Equabank, č. ú. 101 953 9617/6100**, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 1320,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 820,-Kč

Juna Amiko: 350,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 40 stran formátu A5, rete 190,-Kč

Literatura Foiro: 1220,- Kč (*800,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5 (*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".)

Mária Tomašovičová

(1929-2020)

La 25-an de aŭgusto 2020 mortis Mária Tomašovičová – multjara slovaka esperantistino kaj agantino en diversaj kampoj – funkciulo, organizanto, dum iom da tempo ankaŭ SKEF-prezidantino. Aganto por IKUE kaj kontribuanto por pluraj EO-gazetoj, honora membro de UEA. Ŝi naskiĝis 1.2.1929 en Nitra.



Ŝi ripozu en paco! Kiuj el vi konis ŝin, rememoru ŝin hodiaŭ en via menso kaj koro – ŝi estis escepte bonkora kaj afabla persono, kiujn nia movado tre bezonas ankaŭ en nuna tempo.

Informis pri tio ŝia nepo Miroslav Valapka.

Amike kaj malgaje Peter Baláž
SKEF-prezidanto

fotoj el arkivo de Ján Vajs

**Periodikum Českého
esperantského svazu, z.s.
51. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto**

**Předplatné v Česku
(bez členství ve svazu): 200 Kč
Členská evidence a změny adres:
p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,
683 04 Drnovice,
vratislav.hirs@esperanto.cz,
tel. 517 444 117
Uzávěrka příštího čísla:
15.11.2020**

--
**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
51-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj
perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 11 eŭroj, ekster
Eŭropo 13 eŭroj**

**(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)
elektronika versio PDF 6 eŭroj**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
Ĉeĥio, starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto**

Presis: DTP centrum, Svitavy

**Redakto-fermo de la sekva
numero: 15.11.2020**

ISSN 1212-009X

KALENDARO 2020

2020-10-9/11 Konferenco de ĈEA en
Pardubice, Info: cea@esperanto.cz

2020-11-12/15 IEL Bartošovice
NULIGITA pro kovid-19
<https://lernej.weebly.com>

Eksterlande

2020-10-01/04 KAEST en Modra: Scienco kaj
tekniko kiel rimedoj por efektiviĝi daŭripovan
evoluon. Okazos VIRTUALE, aliĝu ĉe:
<https://kaest.ikso.net/2020>
Kotizo 10 eŭroj.

106-a Universala Kongreso de Esperanto 2021

17 – 24 julio 2021, Belfasto, Britio

UEA kredas, ke la venontjara kongreso okazos, la interesatoj povas jam nun aliĝi. Aperis la Unua Bulteno, kiu prezentas Nord-Irandon kiel belan landon kun multaj kulturaj kaj historiaj vidindaĵoj. Por individuaj UEA-membroj el B-landoj estas kotizo 145 eŭroj, por neindividuaj 180 eŭroj, ekde januaro la prezoj leviĝas al 180/225, ekde aprilo al 215/270.



Aliĝilojn kaj la Unuan Bultenon vi
trovos en la retejo de UEA
www.uea.org



*Renkontiĝo de eksaj tendaranoj en Lančov
meze de aŭgusto 2020*



Esperanto-ekspozicio en Žilina



*Senvualigo de memorŝtono en Svitavy
la 5-an de septembro 2020*



Teo, Amo kaj Mondo en Žilina



Projekciita intervjuo kun Ivan Acher



Duo Ludantaj koroj koncertas en Písek